# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

**N° 264**


Januaro 2016



Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle LANGEOIS

Abon-kotizo : 10 € « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasisto : Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76 290 Montivilliers


**Bonne Année 2016 !**

De Bricquebec au Havre en passant par L'Aigle, Hérouville, Rouen, Montivilliers, Granville, Coutances mais aussi Lille, Les Issambres (près de Fréjus, 83) et le château de Grésillon (Baugé, 49), sans oublier Flers, évidemment.

L'année 2015 s'achève après de jolies rencontres, des actions entreprises dont le dénominateur commun est l'Espéranto.

Elles font écho, elles colorent ma vie grâce à des femmes et des hommes engagés dans une belle entreprise aux accents humanistes dont nous avons tant besoin actuellement.

A chacune et à chacun d'entre vous, que plusieurs éclats de joie nourrissent votre énergie pour l'an neuf et dans nos futures assemblées.

Meilleurs Vœux pour 2016 à vous et à vos familiers !!!

**Anne-Marie Leprévost.**

Secrétaire de l' association.



**JUBILEO** de la klubo el Tikhvin (Rusio)

**40 jaroj !**

**Gratulojn !**

Merci d' envoyer vos articles et photos à Yves avant le 1er avril de préférence en format word, libre office ou open office , en JPEG pour les photos. M.L

**Enhavo**


La vorto de A.M Leprévost p.1
Normanda Asocio p.2
Nia vojaĝo en Irano (Yves Nicolas) p.3
Le Havre ( Ekskurso kaj historio) ( Sylvie Caron, B. Dufresne) p.4, p.5
Sur la maro(sûr la mé) ( Henri Rousseau) p.6
Forpaso de G. Michaud, poemo
Esperanto Asocioj p.7
G.A de la Normanda Asocio la 28an de majo 2016 p.8

## Extraits du compte-rendu du Conseil d'administration du 7 novembre



*Jean COLOMBEL, Christian LEVESQUE, Matthieu LECESNE, Gérard SENECAL, Anne-Marie LEPREVOST kaj Sylvie CARON. Mankas Yves kiu fotis.*

Nous nous sommes réunis chez Sylvie CARON où nous avons apprécié son accueil et la belle vue du Havre qu'offre son balcon. Etaient présents Yves NICOLAS et Gérard SENECAL (14), Christian LEVESQUE (50), Anne-Marie LEPREVOST (61), Sylvie CARON et Jean COLOMBEL (76). Excusé : Barthélémy MAURAU (27). Nous avions également invité Matthieu LECESNE du groupe de Rouen en construction.

**Budget et cotisations** : Le vérificateur des comptes annuels est Alain CHALM (76). 71 personnes ont cotisé en 2015, comme en 2013 et 2014. Les membres du Havre ont déjà payé leurs cotisations pour 2016 et Mr Frelon s'est abonné pour les 10 ans à venir en versant 100 €. Avec ces entrées d'argent ainsi que le don de 80 € de Pierre Pottier au nom du groupe d'Yvetot qui vient de mettre fin à ses activités, nous avons un solde de 2400 € identique à celui de juin 2015, lors de l'AG de Bricquebec. Nous estimons nos dépenses annuelles à environ 800 € dont 400 € de frais d'impression et d'expédition du bulletin. Si nous estimons le montant de nos cotisationos à 700 € (**la cotisation normande passant à 10 €/an à partir de 2016**). Notre déficit annuel pourrait être de 100 €. Trésorier : Jean Colombel.

Organisation de la prochaine Assemblée Générale : **le 28 mai à Montivilliers** (commune de Jean Colombel) avec l'intervention de deux conférenciers de grande valeur : Pascal DUBOURG GLATIGNY, chercheur au CNRS qui a fait une conférence remarquée lors de l'UK de Lille et Aburaĥman JUNUSOV du Daguestan, dans le cadre de sa deuxième tournée de conférences en France.

**Excursion au Havre du 4 octobre** : grand succès (voir article et photo dans ce numéro). L'annonce avait été claire, attirante et répétée. Un point de rendez-vous bien repérable et le stationnement aisé. Une pochette « verte » garnie de plusieurs plans de la ville et des environs et un joli DVD réalisé par l'équipe havraise !

Les accueillants très mobilisés pour réaliser des fiches en espéranto de qualité. Journée sans pluie. Une rencontre avec les adhérents locaux, connus et découverts en cette occasion. Un petit bémol pour la longueur du service au déjeuner du midi. Mais bravo pour cette belle réalisation qui nous incite à renouveler l'expérience en 2016.

**Deuxième excursion normande** : probablement à l'automne 2016 à Granville. Prise en charge du projet : Christian Lévesque.

**Bulletin normand** : toujours encourager la diffusion par courriel pour limiter les dépenses. Maintenir l'envoi systématique par courriel à tous mais cesser l'envoi de la version papier quand l'adhésion n'est plus à jour.

**Archives Normandes** : démarches en cours auprès du Fonds Normand de la Bibliothèque de Caen afin de sauvegarder la collection complète des bulletins depuis sa création en 1947. Si accord, Yves se chargerait de scanner l'ensemble de la collection et de l'envoyer à chacune des associations.

**Actualité des groupes** :

**Rouen** : Matthieu a formé un groupe de 3 amis auquel il enseigne à partir de la méthode « i.kurso ». Site web créé. Projet de « café espéranto », expos, en contact avec Pierre Lemarchand.

**Le Havre** : Babilrondo le 3ème samedi du mois, projet d'affiche et prise en charge de l'AG de mai.

**Flers** : cours dans le cadre du réseau d'échanges réciproques de savoir, atelier dans une maison de quartier et groupe « avancé » de 5 personnes le mardi. Tome 3 de l'ouvrage de Christian Bertin, chants du congrès de Lille, du recueil russe de Mikaelo Bronŝtejn.

**Granville-Coutances** : Université Inter Ages 3 débutants, 4 confirmés. Livre de ZEF. 3è jeudi, babilrondo à Coutances.

**Hérouville** 3 débutantes, 5 en cours intermédiaire, 10 à 15 dans le troisième groupe (atelier guidé à tour de rôle selon un programme trimestriel très varié).

**CR d'Anne-Marie Leprévost** (secrétaire).

**Nia vojaĝo en Irano.**

De multaj jaroj mi volis viziti tiun landon ne nur pro ĝia antikva historio sed ankaù pro famaj urboj kaj verkistoj, filmistoj. Mi volis ankaù kompari, per surloka konstato, la informojn kiujn dissendas nia gazetaro pri la ĉiutaga influo de tiea reĝimo kies fundamentoj radikale diferencas de la « okcidentaj ».

Kiam aperis en « Esperanto » reklamo pri turisma aranĝo en Irano por esperantistoj, mi tuj kontaktis la informinton, **Masud** Godarzi.

Jes ja, Persio havis longan historion kies plej fama atesto estas la ruinoj de la tutmonde konata Persepoliso.

Temploj, kolonoj, skulpataĵoj regalas la okulojn de la turistoj kiuj povas imagi la tiean vivon 2500 jaroj antaù Jesuo-Kristo sub regno de Sirius, Darius kaj aliaj famaj reĝoj. Ni tute hazarde renkontiĝis, apud la Trezorejo de Persepolis, kun Florent, franca esperantisto el Orléans !

Ni poste revenis al **Teherano** por ĉeesti la dutagan ***duan Iranan Kongreson de Esperanto.***



Hamzeh Shafiee kaj lia edzino Marzieh tre afable gastigis nin en sia loĝejo kun Bahar kaj Dorsa siaj ĉarmaj kaj ludemaj filinoj. Teherano enhavas 14 milionojn da loĝantoj sur vasta, monteta tereno kiun senĉese, rapide, zigzage, brue trairas ne nombreblaj aùtomobiloj –ofte Peugeot kaj Renault- kaj motorcikloj kiujn rajdas ĝis 3-4 homoj, kompreneble senkaskaj. Ankaù Hamzeh tre lertis por ŝofori ĝis la kongresejo en la moderna Distrikto 22a.

Proksimume kvindek homoj partoprenis tiun kongreson, inter ili 4 eksterlandanoj, Masaja Seŝimo el Japanio, Guy Perrin (kiu ankaù ĉeestis la unuan iranan kongreson), Sophie kaj mi el Francio. La irananoj tuj deziris paroli kaj foti kun ni en tre amika etoso. Ni sentis nin en granda familio ekde la unua minuto ĝis la fino de la kongreso.

Ni ne forgesos la vesperan promenadon, sub dolĉa ĉielo, laù la granda kaj bela Ĉitgar Lago, nova rendevuo de multaj teherananoj. Ĉiuj kongresantoj ĝoje babiladis, petolis, fotadis, interŝanĝis pri multaj aferoj en tre amika etoso.Ni ankaù ne forgesos la postkongresan viziton de la grandega Milad Turo, la viziton de la Parko de la Artistoj kaj la tiean tre bongustan vespermanĝon en vegetara restoracio.

Ni ne forgesos la viglan kaj ege interesan Iranon, ĝian afablan kaj akcepteman popolon.

Malgraù lastminuta rezigno de dudek persona grupo kiu devigis lin ĉion modifi, Masud tre sukcese organizis por mia filino Sophie kaj por mi dektagan vojaĝon. Li dorlotis nin, ĉiam atentema ĉu ni soifas, ĉu ni malsatas. Ni tranoktis kaj manĝis en bonaj hoteloj kaj restoracioj, kaj ni uzis komfortajn aùtobusojn. Li starigis interesan itineron. Post unu taga restado en Teherano, kies trafiko forte impresis nin, ni vizitis lian propran urbon Borujerd. Tiu mezgranda kaj provinca urbo estas tre agrabla kun vasta parko sur proksima monto. Ni konatiĝis kun liaj edzino Mansureh kaj filo Amirali kiuj varme akceptis nin. Poste, ni iris al Ispahano. Ho ! Ispahano! Vera juvelo pro belegaj moskeoj kaj Palaco Ali Qapu ĉirkaù grandega placo, rendevuo de la loĝantoj por vespera pikniko kaj promenado post varmega tago. Pro la ĝardenoj « Ok paradizoj » kaj « Kvardekkolona palaco ». Pro ĝiaj antikvaj pontoj Si-o-se Pol kaj Pol-e Khaju de la Sasanida kaj Safavida periodoj kiuj bedaùrinde transiras tute sekigitan riveron kies akva devojigo fare de la instancoj kolerigas la loĝantojn kaj la lokajn terkulturistojn. Bela Ispahano ĉu iam mi vin revidos ?

Ŝirazo estas tre ŝatata de la irananoj pro ĝiaj citadelo kaj bazaro sed ankaù pro la tomboj de Sa'adi kaj Hafez, du mezepokaj poetoj kiuj laùdis amon, virinojn kaj vinon en siaj verkoj, kiuj humure aù acide kritikis falsajn kredantojn. Multaj homoj venas por murmure deklami iliajn poemojn kun mano tuŝanta la tombon.

La irananoj havas grandan respekton kaj amon por tiuj poetoj, ankaù por Ferdosi kaj Omar Kajam, kiuj defendis la persan kulturon.

Nepre ekskursu al Irano ! Tie atendas vin fervoraj samideanoj kiuj ŝatas kontaktojn kun eksterlandanoj por babili, por kompari, por kune evolui al pli tolerema kaj pacama mondo.

**Y. NICOLAS**



## Ekskurso en Le Havre : unua provo, granda sukceso !

Dum la Ĝenerala Asembleo en Bricquebec, ni decidis organizi vizitojn en diversaj partoj de Normandio por kune turismi kaj havi novan kaj alitipan okazon renkontiĝi en nia vizitinda regiono. Le Havre sin proponis por organizi tiun unuan ekskurson.

Vi legos ĉi-sube la raporton de Sylvie Caron sed ni aldonu, ke ĉiuj partoprenintoj laùdis la altnivelan, kvazaù profesian, preparon kaj akompanon de la Havranoj per multaj informoj kaj allogaj dokumentoj. Dankon al ili kaj ĝis baldaù por nova ekskurso en 2016, probable en Granville ! Y. N

« Havraj samideanoj amike akceptis siajn transsejnajn geamikojn en la 4a de oktobro 2015. Ĉiuj normandaj departementoj estis reprezentitaj. Nome : Calvados (2), Eure (1),Manche (4), Orne (3), Seine-Maritime (8).

Partoprenintoj rendevuis piede de statuo de Francisko la Unua antaù piedpromenado de la originaj kvartaloj de Havro ĝis la emblemaj arkitekturaĵoj de Perret.

La gastigantoj entuziasme raportis pri la 500 jara havenurbo kaj la vizitintoj ŝajne ŝanĝis sian opinion pri la koncepto de Perret, kiu en la kvindekaj jaroj konfuzis ankaù la havranoj pro sia avangardismo.

Niaj klubanoj estis ravitaj kaj kuraĝigitaj de la vizito de pli malpli foraj amikoj de Normandio. Ĝis baldaù dum partopreninda ekskurso ie en Normandio ! » **Sylvie CARON**

## L'esperanto dans la ville du Havre( suite et fin )

1967, 17 juin – Déclaration à la sous-préfecture du Havre : Havra Esperantista Grupo (Groupe des espérantistes du Havre). But : étude et propagation de la langue internationale espéranto. Siège social : 37 rue Frédéric Sauvage, Le Havre. (J.O. du 29 juin 1967).

1975, Otobre – Jumelage avec Southampton Group. Rencontres avec nos homologues britanniques suivie d'échanges réguliers entre nos deux villes. 15 espérantophones havrais à Southampton.

1978, participation havraise au congrès de la Fédération sud britannique d'espéranto.

1981-1982, création d'une fresque sur le pignon d'un immeuble dans le quartier du Perrey.




Le peintre a inclus le mot espéranto dedans.

1982, Pâques – 14 havrais au congrès national britannique d'espéranto.

1985, Mars – Dalian (Chine) signe un protocole de jumelage avec Le Havre. Echanges avec nos homologues espérantophones.

1986, octobre – week-end havrais pour un groupe d' Anglais espérantophones.

1987, mai – Week-end britannique pour 8 havrais espérantophones.

1989, mai – week-end havrais pour 8 espérantophones anglais.

1989 à 2008 – Les réunions à l'Hôtel des Sociétés Savantes, rue Jules Lecesne



**Accueil des tournées de conférences internationales.**

2000 : USA, 2002 Daghestan, 2005 Russie, 2006 Tadjikistan, 2007 Népal, 2013 Suisse, 2014 Cuba, 2015 Russie

2001, 19 octobre – Librairie La Galerne, conférence « Langue sans frontières » par Georges Kersaudy (1921-2015), fonctionnaire international, interprète à l'ONU (N.Y) et à Vienne - Ecrivain Espérantophone.

2004, 2 décembre : Conférence à l'Université du Havre avec l'association Science et Culture – « Quelle langue pour l'Europe » par Georges Kersaudy.

2005 – Mise en place par Havra esperantista grupo du site internet « Tourisme et espéranto » - http://www.gvidilo.net .

2008, 26 janvier – Le Havre en espéranto sur Wikipédia.

2013, 11 avril – Fort de Tourneville, conférence sur l'espéranto par Mireille Grosjean du Centre culturel Espéranto de la Chaux de Fond (Canton de Neuchâtel –Suisse).

**D' après**
**Bernard DUFRESNE**



---



## LA ERAROJ DE KRISTIANO LA EPISKOPO

Informitaj pri prelego de Ivo Nikola pri Irano, sud-manikaj grupanoj decidis ĉeesti tiun kunvenon, la 1an de decembro. Laù aserto de Kristiano La Episkopo, ke la prelego okazos je 20h30, ili kalkulis la tempon por akurate atingi Domon de la Asocioj, en Hérouville. Cécile Dulin, Françoise Glémot, Annick Besneville kaj Kristiano eliris de Granville per aùtomobilo kaj senprobleme atingis la urbaron de Caen. Sed en nigra nokto, ili rondiris, revenis, reiris, laù la labirintaj stratoj de Hérouville kaj perdis multe da tempo antaù ol, finfine sed ne senpene, trovi la kunvenejon. « Tamen ni sukcesis ! Kaj estas akurataj ! » fieris Kristanio. Efektive estis precize 20h30 !
Bedaùrinde estis kodo por eniri. Kiel fari ? Kristiano vidis lumon en ĉambro kaj frapis al la fenestro por ke iu malŝlosu la enirpordon. Kiam tio estis farita, ili eniris kaj uzis la ŝtuparon ĝis la unua etaĝo kie kutime okazas la kunvenoj de Hérouville Esperanto. Surprizo atendis ilin : neniu lumo, neniu samideano. Kristiano telefonis al Ivo kiu respondis, ke la prelego finiĝis je 20 h 00 ! Tiam Kristiano ekkonsciis pri sia miskompreno : jes ja, fakte, la prelego estis anoncita je 18h30 !!!
« Erari estas home-respondis Ivo- nun ni vespermanĝas en kafejo « Café des Arts », venu kun ni ! ». Do, la sud-manikanoj denove uzis la aùtomobilon por atingi la kafejon, denove rondiris, zigzagis, perdiĝis, parte pro tio, ke Kristiano miskomprenis la nomon de la kafejo. Uf ! Ili sukcesis kaj ĝojis iom ripozi kaj babili kun la lokaj esperantistoj. « Ne gravas, kompatinda kvaropo, se vi havas iom da tempo, mi fulmrapide denove prelegos por vi. Duonhoro sufiĉos. » proponis Ivo.
Do, li gvidis la grupeton ĝis la Domo de la Asocioj, sed vane esploris sian tornistron por preni la senalarmigan ŝlosilon,« Ha ! Ne gravas, vi venos hejmen. ». Tamen post kelkaj minutoj, li trovis la ŝlosilon sub naztuko en iu el siaj multaj poŝoj. Estis jam la 22a kaj necesis plia tempo por instali la materialon.
La jam lacaj spektantoj ĝuis belan kaj interesan prelegon pri Irano, laù programo ne vere turista sed politika, privirina, kultura. Sed Ivo, entuziasma pri la temo, ne plu prizorgis la horloĝon kaj la prezentado kiu devus estis tridek minuta fariĝis unu hora kaj baldaù naùdek minuta… ĝis kiam lia edzino telefonis «Kion okazis al ci, kion ci faras ? ». Estis jam 23h30 !
La 4 spektintoj forveturis post la noktomezo kaj atingis Granville je 01h30, ege lacaj kaj feliĉaj enlitiĝi. Kristiano pardonpetis pro siaj eraroj sed liaj tri akompanantoj tuj asertis, ke ili ĝuis strangan kaj amuzan aventuron, eĉ opiniis la tempon ne tro longa. Neniu el ili forgesos tiun eskapon en Hérouville dank'al Ivo pro la prelego kaj dank'al la amuzaj eraroj de Kristiano La Episkopo !

**Christian LEVESQUE**





**SUR LA MARO**



inspirita de la fama kanto "Sû la mé "
de Alfred Rossel, el Cherbourg 1841-1926, adaptis Henri Rousseau

Rekanto :
Starante sur kabo Hago, (1)
Front' al maro mi pensas,
Pri tiuj kiuj vojaĝas,
Fore, danĝere sur maro !
Fore, lontane, fore danĝere sur maro !

1 Maro ja estas belaĵo,
Sed ĉefe se belveteras,
Se dum piedoj en herbo,
Oni nenion riskas !
Ĉar se ĝi ekkoleriĝas,
Ĝis la hejmo eniras,
Ĝia voĉo de sireno,
Kaj en ni naskiĝas timo !



Rekanto

2 Mi ŝatas dum festotagoj
Vidi ŝipojn ĉe la kajoj,
Ŝirmitajn kontraù la ŝtormo,
De la kabo ĝis la Monto. (2)
Estas lokoj pli sekuraj
Por niaj maristoj bravaj,
Ol noktoj dum tempestegoj
Plenaj je ĉiuj danĝeroj !

Rekanto

3 Foje ĝi transsalti povas
La digon kies la blokoj
Tremas pro ĝiaj bategoj,
Kaj tiam mi tuj pensas
Pri niaj maristoj bravaj
Tiavetere surmaraj !
Estas tiom da kaptiloj
Sur la vastaj oceanoj !

Rekanto

4 Min obsedas tiuj pensoj
Ĉar nun du el miaj filoj
Laboras en Maristaro
Pro la militista servo !
Unu en Madagaskaro,
La dua en Pacifiko,
Ĝis la bordo Amerika,
Sed baldaù estos finita !

Rekanto

Refrain :
Quand je syis sû le rivage,
Byin tranquile: êt'-ous coum' mai ?
J'pense à ceuss' qui sount en vyage,
En vyage ou louan sû la mé.
En vyage ou louan,
En vyage ou louan, sû la mé.

La mé ch'est vraiment superbe,
Et j'aim' byin, quand i fait biaô,
L'été dans nous clios en herbe
La vaî s'endormin eun miot.
Mais quaund o s'fach', la vilaine,
Et qu'no z-entend de tcheu nous
La gross' vouaix de la siraine,
No z'en a quasiment poû.

Refrain

J'aim' byin dans les jours de faête,
Quand nous batiaôx sont à quai,
A l'abri de la tempaête
A Tchidbourg, comme ou Becquet;
Ch'est là qu'i sont l'mûx, sans doute,
Des trouais couleurs pavouaisâés;
Mais, la nyit, dans la Déroute
Hélas ! qu'i sont exposâés !

Refrain



Quand o saôt' pas d'ssus la Digue
Dont o fait tremblyi les bliocs,
Qu'à l'ancre l'vaisseau s'fatigue,
Ah, ver ! je pense ès mat'lots.
Arrverront-i-lûs villages
Et pourront-i-ratterri ?
J'avaons de si maôvais parages
De Barflieu jusqu'à Goury.



dessin Michelle Paumier
Kantateliero Lillo 2015

J'i deux fils dans la mareine
— Deux forts et hardis gaillards; —
L'eun revyint de Cochincheine,
L'aôtre de Madagascar.
I rentrent, lû corvâe faite;
D'y penso, no n'en vit pas,
Mais, que j'pliains, sans les counnaîte,
Ceuss' qui sont restâés là-bas.

Refrain

(1) Kabo Hago (France : Cap de la Hague). Plej nord-oesta kabo de la duoninsulo "Cotentin" en Normandio

(2 ) La Monto : Monto Sankta Mikaelo, (Le Mont Saint Michel) mondfame konata pro sia abatejo.

**Forpaso de Gisèle MICHAUD**

Jean-Pierre DANVY* informis nin pri la forpaso la 4an de septembro de Gisèle MICHAUD en Granville kie ŝi vivis jam de multaj jaroj. Ŝi estis 94 jaraĝa sed ĝis la lastaj tagoj restis vigla kaj babilema kiel atestis Jean-Pierre en sia mesaĝo : «*Mi laste vidis ŝin sabaton la 29an de aùgusto en la ĉiusemajna bazaro. Ŝi ne aspektis aparte laca,(eĉ male: la ekzamenoj en Caen ŝajnis bonaj!) kaj ŝi dankis pro mia poŝtkarto el Lille*.»

Gisèle plurfoje ĉeestis niajn regionajn aranĝojn kie ŝi ŝatis rakonti anekdotojn. Ekz., dum la Dua Mondmilito ŝia edzo Roger Michaud instruis plu esperanton sub la severa kontrolo de germana soldatino pli konita kiel « souris grise ».

Roger Michaud tre aktivis en SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) en Parizo. Ni aùskultu Kreŝimir BARKOVIC** : «Roger multe helpis min tuj post mia alveno al Parizo kaj pri la laboro ĉe SAT. Kiam mi komencis labori ĉe SAT, Roger laboris kiel volontulo en la oficejo kaj ni amikiĝis. Li montris multe da simpatio al mi kaj mia edzino kaj faris klopodojn por ke mi reguligu mian situacion, ricevu laborkarton kaj rajton labori ĉe SAT. Tiam mi tute ne parolis la francan kaj lia amikeco estis tre grava por mi. Tiutempe familio Michaud loĝis en la apudpariza urbo Pantin kaj li ofte invitis nin hejmen, kie ni konatiĝis kun lia edzino Gisèle. Post la emeritiĝo la familio transloĝiĝis al Normandio sed nia amikeco ne ĉesis kaj ni kelkfoje vizitis ilin en la nova loĝejo. Eĉ post ne atendita forpaso de Roger ni restis amikoj kun Gisèle. Mi perdis karan amikinon kaj familio Michaud restos en mia koro gîs mia morto.»

Antaù kelkaj jaroj, Gisèle donacis sian esperantan bibliotekon al la normanda asocio kiu disdonis la plej multajn librojn al partoprenantoj de diversaj aranĝoj.

YN

*Jean-Pierre Danvy. Multe verkis, tradukis en esperanto. Kunredaktis kun Ĵak Le Puil la 'Grand Dictionnaire Français Esperanto' (1992). Li esperantigis verkon de Edmond Privat « Vizio de juna virino –vision d'une jeune femme » en 2014.

**Kreŝimir Barkovic. Eks-ĝenerala sekretario de SAT, li ankaù redaktis la organon « Sennaciulo » de 1983 ĝis 2008. Tre leginda estas lia esperantigo de «7000 tagoj en Siberio » (1983)  de la kroato Karlo Ŝtajner kiu restadis dudek jarojn en la koncentrejoj de Siberio.

Post la 13a de novembro, nia amiko el Tikhvin Mikaelo BRONŜTEJN verkis tiun poemon

Hieraŭ vespere eksplodis la vivo
de mia amata Parizo.
Teruraj atakoj, freneza defio
al penoj de la civilizo.
Ho, Majstro, mi kredis pri " homoj kun homoj"
sed preter la kredo plej bela
ĉielen eksoras animoj-fantomoj,
viktimoj de l'hato kruela.
Kaj estas amara konkludo tre klara:
ne rektas la vojo celita.
La nuboj peziĝas, la mond' freneziĝas
ĉe nova impeto milita.

2015 11 14

**LES ASSOCIATIONS ONT BESOIN DE NOTRE ADHESION !**

Une nouvelle année commence. Les associations nationales et internationales d'espéranto, comme notre association régionale, ont besoin de notre adhésion pour organiser des congrès de grande ampleur, éditer des livres et des revues, donner à l'espéranto la place qu'il mérite dans les instances culturelles et politiques (Unesco, Europe, etc). L'espéranto ne bénéficie que trop rarement du soutien matériel et financier des états, il dépend de l'engagement de ses locuteurs.
Adhérons aux associations !
.


UEA (Universala Esperanto Asocio)
Espéranto-France
SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda)
SAT-Amikaro (Union des travailleurs espérantistes de langue française).

***Notre prochain bulletin reviendra sur ces différentes associations***

**Et pour vos stages** :

Maison Culturelle de l'Espéranto. Château de Grésillon à Baugé en Anjou. www.gresillon.org. Cours intensifs sur 3 niveaux du 8 au 16 avril + examens internationaux CECRL (B1, B2, C1) du 15 au 16 avril.

Espéranto Centre Kvinpetalo (86410 Bouresse). www.kvinpetalo.org. Programme 2016 à venir.




## L'Assemblée Générale Normande aura lieu le samedi 28 mai 2016 à Montivilliers(76)

Nous serons cette fois accueillis sur les terres de Jean Colombel, notre trésorier, à Montivilliers, charmante commune de Seine-Maritime. Surtout, réservez dès maintenant cette date pour de très bonnes raisons.
D'abord pour le plaisir d'être ensemble, bien évidemment, mais également pour partager des idées et des projets et faire aller de l'avant notre association régionale. C'est au sein de cette Assemblée Générale que nous avons depuis quelques années repensé la parution du bulletin et mis en place de nouvelles initiatives comme les conférences dans les groupes locaux ou la rencontre touristique brillamment inaugurée en 2015 par le groupe du Havre.
C'est aussi parce que la partie culturelle de cette Assemblée Générale sera cette année particulièrement riche. Jugez-en plutôt :

Conférence de **Pascal Dubourg Glatigny** : Chercheur au CNRS, spécialiste de l'histoire de l'art et enseignant universitaire en France et dans de nombreux pays, Pascal reprendra pour nous la conférence qu'il présenta avec succès lors du Congrès Universel de Lille en 2015 " La lingva demando en la nuntempa arto "



Pascal est originaire de Normandie Polyglotte, il s'est initié à l'espéranto dans son adolescence grâce au cours dispensé par notre ami Pierre Lemarchand.

Conférence de **Abdurahman Junusov** sur le ***Daguestan***. Abdurahman sera en France dans le cadre d'une deuxième tournée de conférences en France pour un sujet fort intéressant. Le Daguestan est une république caucasienne de Russie, au bord de la mer Caspienne où se côtoient de nombreuses cultures et se parlent plusieurs dizaines de langues. Proche de la Tchétchénie, le Daguestan vit souvent de fortes tensions politiques.



Les talents artistiques d'**Alain Chalm**.



Alain, membre du groupe du Havre, est un bijoutier professionnel. C'est un artiste aux multiples talents qui agrémentera notre salle de travail de plusieurs de ses œuvres.
A lire absolument son interview dans le prochain numéro du Bulletin Normand !

Tous les détails dans notre numéro à paraître début mai !



***Fiche d'Adhésion à l'association et d'abonnement au Bulletin Normand***
Chèque de 10 €, à l'ordre de « Esperanto Normandie ». CCP 283.40 H 035.
à adresser à Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76 290 Montivilliers.

Nom et Prénom : ..........................................................................................
Adresse : .....................................................................................................

Courriel:.................................................@.........................................................

Téléphone : ............................................portable ............................................

Merci de préciser si vous souhaitez recevoir la version papier du bulletin (nous encourageons la version électronique, de meilleure qualité visuelle et qui réduit nos frais postaux)
Je préfère recevoir la version papier *
Je préfère ne recevoir que la version électronique *